

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige. (Svedujo.)*

Upsala.

Januaro 1896.

N:o 1.

La nova jaro.

Ni deziras al niaj legantoj feliĉon kaj ĝojon en la nova jaro 1896.

Niaj legantoj kune kun ni ekdeziru, ke tiu ĉi jaro estu feliĉa ankaŭ por nia kara lingvo kaj alportu sukceson al nia afero.

En la komenco de l' jaro pasinta nia lingvo ŝajne sin trovis en tre bona stato: "la fulmotondro de reformoj per uno fojo purigis la atmosferon kaj donacis al ni pacon kaj lumon por longa tempo . . . kaj por nia afero komenciĝis nun nova tempo de jam senhalta kaj senmalhelpa progresado" . . . Tamen, kiel niaj legantoj mem scias, nian aferon trafis baldaŭ grava malfeliĉo, kiu venis tute neatendita, neantaŭvidita, kaj la jaro, komencita kun la plej bonaj esperoj, transformiĝis en jaron, tre malfavoran por Esperanto. Multaj el niaj amikoj perdis la kuraĝon, multaj mallevis la manojn, ne sciante, ĉu oni povas daŭrigi la bataladon. Sed ĉia malbono, ĉia malfeliĉo enhavas ĉiam ion bonan kaj utilan: la ekbato, kiu faligas kaj mortigas malfortulon, nur pruvas la forton kaj la vivpovon de tiu, kiu ne falas. Esperanto elsuferis la malfeliĉon, la ekbato ne mortigis nian lingvon, kaj nun ni vidas, ke ĝi ree progresas, denove vastiĝas, fortiĝas kaj riĉiĝas. Ĉu tio ĉi ne pruvas, ke nia ideo ne estas utopio, ke lingvo internacia ne estas fantomo kaj ke ni servas al afero efektive utila kaj efektivegebla? Ni sekve ne timu, ke nia afero pereos, se la eksteraj cirkonstancoj iafoje prokrastas ĝian progresadon. Tial ni povas komenci la novan jaron kun novaj esperoj, kun novaj fortoj kaj kun nova energio. Ni iru kuraĝe antaŭen, sciante ke nia laboro ne pereos vane kaj ke ĉio, kion ni faras por bono de Esperanto, estas paŝo al solvo de la problemo, kiu okupas la mondon en daŭro de jam tri centjaroj.

La nuna stato de nia lingvo povas nur jesigi ĉion diritan. La aliĝo de "L'Etranger" kaj la bonaj sciigoj, kiuj regule venas el Francujo, la sukcesoj de nia lingvo en Portugalujo, la novaj eldonoj, riĉigontaj nian literaturon, — ĉio pruvas, ke niaj amikoj ne ĉesas laboradi kaj ke Esperanto senhalte vastiĝas. Plenan sukceson al ĉies laboro, rapidan progreson al nia afero!

El Francujo.


Kaŭze la artikolo pri Esperanto, presita en la Pariza ĵurnalo *l'Eclair* kaj en aliaj ĵurnaloj de Parizo, rondo da homoj, tre kompetentaj en la lingvistiko kaj loĝantaj en la Francuja ĉefurbo, konatiĝis kun nia lingvo amata. Tiuj sinjoroj opinias, ke “Esperanto estas, eble, malpli laŭdinda pro ĝia miriga simpleco, ĝia severa logiko, ĝia fleksebleco, riĉeco kaj facileco nekredibla, ol pro la plej bona kunigo de ĝiaj ecoj kaj elementoj en unu lingvistikan tutajon perfekte unuspecan“. Ili diras, ke, “se ili ĝin ne vidus per siaj propraj okuloj, neniam ili kredus, ke estas eble doni en tia maniero al arta lingvo, kun karaktero tre speciala, la fizionomion de lingvo natura kaj vivanta“.

La supredirita artikolo, kies aŭtoro aliĝis al Esperanto, elvokis multe da leteroj, petantaj informon pri nia lingvo. Kelkaj el ili venis de tre malproksime, el Tanger, el Tebourba (Tunisujo) el Sofia (Bulgarujo), el Portland (Nord-Ameriko) k. t. p. Ni jam ricevis tre seriozajn aliĝojn post la sendo de la lernolibroj menditaj aŭ de niaj klarigoj pri la lingvo. Unu el la novaj varbitoj, doktoro G. Delfau, membro de la suprenomita instruitula rondo, tre varme laboras por Esperanto en Parizo. Alia, sinjoro Arduin en Bordeaux, petis min traduki por li, en nian lingvon, komercan cirkuleron tre lerte verkitan, kiu komenciĝas rekte per tiuj ĉi vortoj: “La lingvo internacia Esperanto, ebligante facilan korespondadon inter ĉiuj popoloj, kaŭzos aliformiĝon grandegan en la komercaj rilatoj“. Poste venas la pravigo de tiu diro kaj la komerca temo de l' cirkulero kun la kostotabelo de l' firmo. La agado de nia nova amiko en urbo tiel granda kaj komerca, kiel Bordeaux, estos tiom pli efika, ke alia aliĝinto de l' sama urbo, direktoro de komerca kaj literatura lernejo, montris la intencan havi paroladojn pri nia lingvo, kiam li ĝin scios bone. Se mi ne eraras, sinjoro Arduin komencas la serion da komercistoj, uzantaj Esperanton por iliaj cirkuleroj.

Tuj kiam ni estos ricevintaj la novan malgrandetan broŝuron por propagando, kiun nia kara gvidanto elverkis kaj mi tradukis por Francoj, ni disdonos aŭ dissendos almenaŭ 3,000 da ekzempleroj en la tuta Francujo, por ke la jam tre bone komencita agitado daŭru kaj fariĝu plene fruktodona.

Sinjoro Lombard sendis al ni sian aliĝon kaj al la artikolo Esperanta, kiu estas publikigita en la januara numero de *l'Etranger*, li mem aldonis gramatikajn rimarkojn. En la fino de ili, li flame parolas pri Esperanto, levante ĝis la ĉielon la mirindan verkon de doktoro Zamenhof. La aliĝo de tia homo, kiel sinjoro Lombard, estas aparte grava por nia afero, tiom pli, ke li ĝin amas varmege kaj vidas en ĝi “nekompareblan ilon por la fratiĝo de ĉiuj popoloj“. Li, kiel ni, volas, ke konante pli bone unu la alian, la homoj sin komprenu, sin estimu, sin amu reciproke. Li, kiel ni, volas, ke “dissaltu la obstinaj baroj (de malamikeco) per la sankta amo disbatitaj, ke la popoloj faru en konsento unu grandan rondon familian“, kiel ni kantas en nia himno tiel bela. La sameco de niaj entreprenoj unuigis nin, kaj ĉiu esperantisto certe penados per ĉiuj fortoj konigi ĉie la bonegan ĵurnalon de nia varma amiko, tiom pli, ke laborante por ĝi, ni laboras por ni, aŭ, pli vere, ni celas noblan kaj komunan celon.

L. de Beaufront (Epernay).



Ĉe la nova jaro.

Finigis jam por ni malnova jaro
Eterne pasis ĝiaj tagoj for.
Tre bona estis ĝi por la homaro,
Kaj ni ĝiu danku el la tuta kor'!


Sonoras adiaŭaj sonoriloj
Solene super land' kaj super mar',
Kaj ekesperas de l' homar' la filoj,
Ĉar venos baldaŭ la estonta jar'.

Malfermas iu pordon. Jen infano
Aperas bela en la ĉambr' al ni,
Portante libron en malgranda mano,
La bona nova jaro estas ĝi.

Sed kio estas de la libr' enhavo?
Feliĉo aŭ malbono? Diru ĝin!
Benita paco aŭ kruela glavo?
Ĉu venos ĝojo aŭ malĝojo nin?

Ne scias ni kaŝitan estontecon,
Ĉar restas ĉio en la man' de Di'.
Sed kion ajn sendados Li, bonecon
Li donos, kaj kontentaj estu ni.


Otto Zeidlitz.



Kanto.

En mia Brust' varmega kaj bolanta
Konservas sin tre multaj sonoj ĉarmaj,
Kaj kiel mi en bela fajra kanto
Elverŝi ilin volus per la larmoj!
En kanto tiu ĉi eldiri miajn sentojn,
Rakonti kiel am' flamigas mian koron;
En kanto tiu ĉi suferojn kaj turmentojn
Kunigi nur en unu ploron.
Por ke kant' tiu ĉi ektuŝu aŭdon ŝian,
La koro ŝia ankaŭ ekdoloru;
Por ke aŭdante min, — sopiran ploron mian,
Ŝi ankaŭ tiel same ploru!

Dm. Jegorov.



El la libro de miaj fabloj.

En Egiptujo, en tempoj de tebaj Faraonoj, ia transveturanta juna fakiro aranĝis al la loĝantoj amuzadon... En valo, pli belega ol la valoj de Eŭfrato, li faris per ia sorĉo lagon, plenan da larmoj de mizeruloj kaj mal-liberuloj, da larmoj de maljunuloj kaj infanoj, da larmoj de vidvinoj kaj orfoj... Kaj, pleniginte tiun ĉi lagon ĝis la bordoj, la fakiro restigis ĝin por mirigo de saĝuloj...

Sur tiu ĉi lago, ĉe brilo de luno, ĉe sonoj de harpoj kaj lumo de mult-koloroj fajroj, en ĉiu festo la ŝipetoj de Faraonoj naĝadis kiel blankaj cignoj... La ĥoroj de najtingaloj, disĝemataj per ameca kanto, traplenigadis per sonetoj la aeron, plenan da bonodoro kaj varmeto... Malsobrigitaj per sorĉo de belegaj noktoj, la kapoj de l' egiptanoj alkliniĝadis al la revoj pri la superteraj

landoj de beleco kaj poezio, de feliĉo kaj volupto... La luksaj ŝipetoj naĝadis trankvile kaj majeste sur la vitra maso, sur la bruetanta kaj murmuranta kristala ondo, tiel mallaŭta kiel respiro de mizerulo, kiel tombo de homa feliĉo.

Tie kaj ie la mano de petolanta infano ĵetadis en tiun ĉi akvon belegajn rozojn; la rozoj tuj paliĝadis... Kiam iu trempadis okaze la randon de sia multekosta vesto en la lagon — sur la vesto restadis makulo... Virino, varnigita per narkotikoj de cirkaŭprenoj, volis estingi la soifon de la flamanta buŝo per la fluidaĵo de l' lago, sed vane...

Tio ĉi fine ekkolerigis la Faraonojn, incitis la homojn, kiuj deziris malsobron. Oni alvokis alian maljunan fakiron, por ke li elsekigu la sorĉan lagon.

“Ekzistas nur unu rimedo necerta, — diris li, klinante humile la kapon, oni povas elsekigi la lagon sole per oro!”

Kaj alvenadis multehavantaj riĉuloj kaj ĉiu ĵetadis en la lagon pecon da oro...

Kaj alvenadis pli malriĉaj kaj du aŭ tri el ili kolektadis unu moneron...

La lago restis.

Tiam el la tuta Egiptujo oni alvokis amasojn da popolo kaj ĉiu kiu povis, ĵetadis oron en la lagon.

Sed la larva lago ne sekiĝadis.

Kontraŭe. Ju pli da oro oni ĵetadis en ĝin, des pli leviĝadis la nivelo de l' lago, ĝis fine la akvo eliris super la bordoj, superverŝante la valojn de la tuta Egiptujo.

Kaj de malproksimo rigardis tion la sfinkso, ŝtona, malvarma kaj senmova. Kvankam ĝi ĉiam estis silentanta kaj plena da enigmo, — nun tamen ĝi diris:

“La elverŝitajn larmojn neniu viŝos neniam!”...

Tiun ĉi fablon nuntempaj homoj tradukis en siajn lingvojn kaj — strange — ĉiuj donis al ĝi la saman titolon: filantropio.

Mirinde!...

Jozef Wasniewski.

Estas jam kavo en ter' elfosita...

(El la rusa poeto Nikitin).

Estas jam kavo en ter' elfosita.
Vivo malgaja kaj vivo ermita!
Ĝi rifugejon ne havis turmenta,
Ĝi kiel nokto aŭtuna silenta
Iris laŭ vojo kun granda mizer',
Mortis ĝi kiel en stepo fajrer'.

Mia kruela ekdormu do sorto!
Ĉerka tegmento min kovros kun forto,
Estos ĝi forte de ter' alpremita,
Estos ja nur unu homo prenita...
Kaj al neniu aperos dolor',
Restos li ja en nenies memor'.

Jen ĝi aŭdiĝas, senzorga la kanto!
Gasto tombeja, fluganta kantanto
Supre sin banas en blua aero,
Sonas arĝente la kant' en libero.
Finu!... Pri l' vivo finiĝis la tem',
Estas bezona nek kanto, nek ĝem'.

Seleznet.

Novajoj.

S-ro A. Z. en Poltava transsendis al la redakcio de nia gazeto 100 rublojn por subteni la gazeton. Por la sama celo ni ricevis de iu nekonata rusa amiko 9 rubl. 79 kop., kaj de s-ro S. el Ĥarkov 1 rublon. Plej koran dankon!

* * *

De D-ro D. Marignoni ni ricevis por la celoj de nia afero 90 kopekojn, de s-ro I. Lojko por la sama celo ni ricevis 2 r. 70 kop.

* * *

Baldaŭ eliros malgranda broŝuro pri *internacia korespondado* per Esperanto; post 2 semajnoj eliros eldono rusa, post 6—8 semajnoj eldono franca; estas nun preparataj eldonoj en aliaj lingvoj.

* * *

Baldaŭ estos eldonita ankaŭ *Adresaro de esperantistoj, serio XVI*, aranĝita jam en nova maniero.

* * *

Estas presata kaj baldaŭ eliros la esperanta traduko de bela rakonto: "Fantomoj", apartenanta al la glora, juna rusa verkisto *V. Korolenko*. La traduko estas presata laŭ la permeso de la aŭtoro.

* * *

En *Upsala*, Svedujo, s-ro V. Langlet havis du publikajn paroladojn pri sia vojaĝo (nomita en nia prova nro) tra Eŭropo. Inter alie s-ro L. ankaŭ montris al siaj aŭskultantoj la grandan utilon scii nian lingvon, precipe kiam oni vojaĝas en Rusujo, kie oni en preskaŭ ĉiu pli granda urbo trovas almenaŭ kelkajn esperantistojn. La parolanto diris ke sen esperanto lia vojaĝo eĉ tute ne povus efektiviĝi.

* * *

Oni sciigis nin, ke s-ro M. Neustrojev en Nytva (Rusujo, gubernio Perm) intencas eldoni projekton de lingvo internacia sub la titolo "Nova Esperanto". Ne sciante de kia indico estas tiu ĉi laboro, ni tre bedaŭras, ke s-ro Neustrojev ne elektis por sia lingvo alian nomon, ĉar povas esti, ke la publiko mikso nian lingvo kun la produktajo de s-ro Neustrojev kaj tio ĉi aperigos nekomprenejaĵojn kaj malutilos al la vera Esperanto. Ni petas niajn amikojn tiel aŭ alie zorgi, ke tio ĉi ne okazu kaj ke nia lingvo ne estu mikсата kun la falsifikacio de s-ro Neustrojev.

* * *

Kredeble ĉiuj amikoj de lingvo internacia kun plezuro ekscios, ke en majo de la nuna jaro estos proponita al la kolektiĝonta en Washington tutmonda poŝta kongreso *la internacia poŝtsigno*, kiu havos indon en ĉiuj landoj kaj tiamaniere donos la eblon facile transsendadi malgrandajn sumojn da mono el unu lando en la alian. Se la kongreso aprobos kaj akceptos la projekton, la poŝtsigno, kiu kostos 25 centimojn, estos kredeble pretigata en Bern, kie

loĝas la direktoro de la tutmonda poŝta ligo, kaj dissendata en ĉiujn landojn, partoprenantajn en la tutmonda poŝta ligo.

* * *

En la novembra numero de la ĵurnalo *L'Etranger* estis publikitaj atestoj, kiuj pruvas, ke nia lingvo tute taŭgas por buŝaj interkomunikiĝoj de diverslandanoj (vidu la "Ĥronikon" en nia antaŭa numero). Tio ĉi altiris la atenton de la pariza ĵurnalistaro. Unu el la redaktoroj de "*L'Eclair*" vizitis nian junan sed varman amikon, s-ron E. d'Eyssautier, por ricevi informon pri nia lingvo. Post tiu ĉi vizito li skribis longan artikolon, kiu estis presita en *L'Eclair* kaj ankaŭ en *La Liberté* kaj en *Les Annales Politiques et Littéraires*. La artikolo estas favora al nia lingvo kaj enhavas la adreson de s-ro L. de Beaufront. Dank' al tio s-ro L. de Beaufront de ĉiuj flankoj ricevas leterojn kun demandoj pri Esperanto. Kelkaj el la demandoj sin montras pretaj fariĝi bonaj amikoj de nia afero. Tio ĉi denove pruvas, kiel grandan signifon havas por nia lingvo la ĵurnalo *L'Etranger*, kiu konsentis presadi artikolojn en nia lingvo kaj tiamaniere donas eblon al ĵurnalisto de ĉiu nacio akiri grandan legantaron en diversaj landoj. Ni ne dubas, ke niaj amikoj abonos *L'Etranger* kaj laborados por ĝi.

* * *

La societo *Espero* en Peterburgo petas nin presi la sekvantan cirku-
leron, kiun ĝi dissendis al kelkaj esperantistoj kaj esperantaj kluboj:

"S. Peterburgo, XII ¹⁵/₂₇, 1895.

La societo "Espero" entreprenas la eldonon de l' verko *Kain* de Byron, tradukita en Esperanto de s-ro A. Kofman, kaj, ne havante sufiĉe da rimedoj, havas honoron sin turni al Vi, kun la peto subteni tiun ĉi aferon per subskribo de ia sumo da mono, kiu estos returnita al Vi kun granda danko post la disvendado de la libro.

Kun alta estimo kaj saluto internacia

Prezidanto *F. de Kanaloŝŝy-Lefler*.

Sekretario *I. Beker*.

La leterojn kaj monon oni petas adresi al s-ro *N. Borovko*, Rusujo, Peterburgo, Peterburgskaja Storoŝa, Malaja Dvorjanskaja, №. 11."

Ni ne dubas, ke niaj amikoj rapidos plenumi la peton de la estimata societo, des pli, ke la mono estos poste returnita al ĉiuj oferintoj. La bela verko de Byron estas tre bone tradukita el la lingvo angla de s-ro Kofman, kies talenton niaj amikoj sufiĉe konas.

* * *

D-ro Zamenhof transsendis al ni la sekvantan leteron:

"En N:o 6 (42) de la "Esperantisto" estis lokita la artikolo "Pseŭdo-Esperantistoj". Por ke oni ne pensu, ke la tie nomata s-ro X. estas persono elpensita, mi opinias ĝusta komuniki al la esperantistoj la sekvantan: En la komenco mem de la "Adresaro" (serio I) sin trovas inter aliaj la nomo: "Avilov, Fedor Dmitriĉ, studento de la Instituto Historia-Filologia. S.-Peterburg. R." Tio ĉi signifas, ke la suprenomita persono ellernis Esperanton senkondiĉe jam en la jaro 1889. Sed vi grande eraros, se vi pensas, ke efektive estis tiel. Li ne sole ne ellernis la lingvon, sed eĉ ĝis nun havis nenian ideon pri la sorto de la afero, kies kvazaŭ prezentanto li estis jam longe kalkulata. Ho, malfeliĉa nia afero, se signifa parto de ni estas simila al tiu ĉi Avilov! Kaj kio garantias la kontraŭan? Nun mi konsciis (ĉar mi, la skribanta, estas Avilov) mian multepezan kulpon antaŭ la plej estimata genia kreinto de la lingvo, antaŭ esperantistoj,

antaŭ homaro, — kaj tial mi publike pentas, esperante, ke aliaj al mi similaj esperantistoj sekvos mian ekzemplon kaj por forgesigi sian pekon promesos publike laboradi, kiel mi ĝin promesas. Trarigardu ekzemple la "Adresaron", vidu la senfine ripetatan "O" en krampoj kaj pensu, kian grandegulan kreskon ricevus Esperanto, se ni ĉiuj eĉ nemulte imitus la agadon de s-ro Ostrovski! Sendube multaj inter ni faras ĉion, kion ili povas, sed iliaj penoj tiom same sendube perdiĝas vane, ĉar malestas unueco en la manieroj de disvastigado. Oni devus ellabori komunan planon, unuigi ĉiujn jam ne unu fojon proponitajn diversajn manierojn. Mi volas nun oferadi de tempo al tempo mian laboron kaj monon, sed kion mi devas fari, mi ne scias. — Mi estas ekzemple preta enkasi 1 % de mia salajro, sed se la simila enkaso estas bona kaj ebla, estas necese, ke ĉiuj promesu fari la saman. Se 1 % estas ofero tro granda, ni donu 0,5 %, 0,25 %, sed nepre donadu ĝin regule ni ĉiuj, kiuj havas la kuraĝon sin nomi esperantistoj. Kaj kio estas pli bona, — elspezi la monon por aĉetado de broŝuroj, aŭ por eldonadi novajn verkojn, aŭ por anoncado en gazetoj? Mi provis ĝis nun nur unu manieron de disvastigado: mi aĉetis 10 ricevitajn tie ĉi ekzemplerojn de la nova lernolibro (verko N:o 77) kaj disdonis ilin al miaj kolegoj je ofico. Sed estus eble pli bone disdoni 30 ekzemplerojn da kvinkopeka eldono? Ankoraŭ pli bone estus eble aĉeti 20 poŝtignojn kaj dissendi leterojn al influantaj homoj. Sajnas al mi, ke la lasta maniero estas la plej efika. Mi rimarkis jam, ke la plej grandan impreson mi produktas ĉie, kiam mi rakontas ke s-ro Ostrovski, kiu scias nenian alilandan lingvon, korespondas kun loĝantoj de Afriko kaj Aŭstralio. Tial mi konsilus komuniki al la plej penemaj alilandaj esperantistoj la adresojn de personoj, kiujn oni deziras altiri al nia afero, petante ilin skribi leterojn laŭ la donitaj adresoj kaj promesante al ili skribi egalan nombron da leteroj laŭ la alsendotaj de ili adresoj. Personoj, kiuj ricevas leterojn, tuj vidus la praktikecon de la lingvo kaj tiu ĉi maniero estus la plej konvinka.


F. D. Arilov, instruisto.

Adr. Rusujo, Tiflis. 1-a gimnazio."

Ni ne bezonas ion aldonadi al tiu ĉi sincera konfeso kaj povas nur adresi nian koran saluton al la nova membro de esperanta familio, dezirante plenan sukceson al liaj laboroj por nia lingvo. Koncerne la komunan planon de la disvastigado, pri kiu parolas s-ro A., ni povas nur rimarki, ke tiu plano, laŭ nia opinio, ne nestas ebla, ĉar la rimedo, per kiu oni povas altiri unu personon, ofte ne taŭgas por la alia, kaj unu esperantisto ne estas kapabla por tiu laboro, kiun povas plenumi la dua: unu laboras sukcese, verkante artikolojn por gazetoj kaj publike parolante pri Esperanto, la dua ne estas ĵurnalista kaj oratoro, sed estas bona tradukisto kaj riĉigas nian literaturon, la tria propagandas per anoneoj, leteroj k. t. p. Ĉu ni povas decidi, kia rimedo estas plej efikanta kaj kies laboro estas plej utila? Ĉiu faru, kion li povas, uzante ĉian oportunan okazon por utili al nia afero. Ni konsilus al nia nova amiko antaŭ ĉio aranĝi en sia urbo konstantan vendadon de esperantaj libroj kaj trovi 4—5 personojn, aldonitajn al nia lingvo, por fondi esperantan klubon, ekz. filion de la peterburga societo *Espero*. Tiam la laboro sendube estos pli sukcesa kaj la klubo facile decidus, kiaj manieroj de disvastigado pli taŭgas por ĉia aparta okazo. La korespondado, pri kiu parolas s-ro A. en la fino de la letero, estas efektive rimedi tre rekomendinda.

* * *

En la lastaj monataj tre multaj ĵurnaloj kaj gazetoj parolis pri nia lingvo. La redakcio petas ĉiujn amikojn de Esperanto komunikadi pri tiuj gazetaj artikoloj aŭ, se estas eble, alsendadi la numerojn de la gazetoj, enhavantaj iajn sciigojn pri nia lingvo. De la sekvanta numero ni presados regule, en ĉia numero de nia gazeto pli-malpli detalan raporton pri la gazetoj, kiuj parolis pri Esperanto. La plej gravaj el tiaj gazetaj artikoloj estos tradukataj kaj presataj en "Lingvo Internacia".



Skizoj gramatikaj.

I. El, en, ekster, inter.

Sendube la plej malfacila punkto en ĉia lingvo internacia estas la regula uzado de la prepozicioj, sufiksoj kaj prefiksoj. Ne mirinde, ĉar tiuj ĉi malgrandaj vortetoj kune kun la verbo kaj akuzativo donas la eblon esprimadi la rilatojn inter diversaj objektoj, t. e. esprimadi la pensojn. Se ekzistus nek verbo, nek prepozicioj, nek akuzativo, oni povus nur nomadi la objektojn, kio tute ne estas malfacila, se oni havas bonan vortaron, sed nenia penso tiam povus esti esprimita. Nur la verbo, akuzativo kaj prepozicioj donas sencion al la parolado, donas la eblon fari belajn konstruaĵojn el la kruda vorta materialo. Dum la regula uzado de la verbo estas pli-malpli facila kaj la uzado de la akuzativo estas precize difinita, la uzado de la prepozicioj, kontraŭe, estas tre malfacila, ĉar tie ĉi oni ne povas sin gvidi per sia propra lingvo: en ĉiu lingvo nacia la prepozicioj estas uzataj tre nelogike, kaj unu prepozicio de ia lingvo estas ĉiam tradukata en alian lingvon per diversaj prepozicioj. Nur la kutimo pravigas tian nelogikan uzadon. La aŭtoro de Esperanto antaŭvidis tiun ĉi malhelpon kaj, por eble forigi ĝin, difinis:

a) ke ĉiu prepozicio estu uzata logike, en difinita senco, kaj

b) ke en ĉiuj okazoj, kiam la senco ne montras klare, kia prepozicio devas esti logike uzata, oni uzu la neŭtralan prepozicion *je*, kiu ne havas difinitan signifon.

Sed por uzadi logike la difinitajn prepoziciojn, oni devas antaŭ ĉio scii precize, kian sencion havas ĉiu prepozicio. Kompreneble ne sufiĉas simple traduki en la vortaro ĉiun nacian prepozicion per la internaciaj kaj returne, ĉar se mi ekzemple trovus en la vortaro franca-internacia, ke la franca prepozicio *sur* estas tradukata per la esperanta *sur*, tio ĉi ne klarigus al mi, kiel mi devas traduki la francajn esprimojn: "il est fort sur l'histoire", "sur la fin de l'hiver", "avoir une créance sur qn.", "je compte sur vous", "cela influe sur la santé" k. t. p. Estas klare, ke oni devas en ĉiu vortaro esperanta-nacia bone difini, en kia senco povas esti uzata ĉiu esperanta prepozicio: nur tiam havos ĉiu la eblon regule uzadi la prepoziciojn, nur tiam oni povos perfekte evitadi la naciajn idiotizmojn (t. e. proprajoj de la lingvo) kaj la parolo estos tute internacia, facile komprenebla por homo de ĉiu nacio.

Sed tute ne estas facile difini precize, en kia senco devas esti uzata ĉiu prepozicio, por ke la frazo estu egale komprenebla por franco, germano, svedo, anglo, ruso k. t. p. Mi pensas, ke tion ĉi devas fari la *homoj de diversaj nacioj*, ekzemple en la sekvanta maniero:

Mi, ruso, tradukas ion en Esperanto kaj sendas mian laboraĵon al homo de alia nacio, ekz. al franco. Li atente tralegas mian tradukon kaj faras rimarkon rilate ĉiun frazon, kiu estas por li malfacile komprenebla; li montras en la rimarko, kio malfaciligas la komprenadon, kaj proponas sian propran tradukon de la sama frazo. Poste li sendas mian tradukon ekz. al germano, kiu ripetas la saman laboron kaj sendas la tradukon kun siaj rimarkoj ekz. al anglo k. t. p. Fine la traduko revenas al mi kun multaj korektoj kaj rimarkoj. Tiam mi devas atente trarigardi ĉiujn rimarkojn, ĉiujn korektojn kaj por ĉiu notita frazo elekti tian formon, kiu kontentigus egale la francan, germanan, anglan k. t. p. Mi ricevus tiam verkon, skribitan en la stilo perfekte internacia kaj facile komprenebla por ĉiuj popoloj, t. e. en la stilo

klasike internacia, kiu povus esti modelo por ĉiu, deziranta skribi aŭ paroli en lingvo, komprenebla por ĉiuj.

Kiam ni havos kelkajn verkojn en tia stilo, ili servos al ni kiel materialo por diversaj konkludoj rilate la internacian gramatikon, interalie por difini precize la signifon de la prepozicioj. Ĝis ni ne havas tian stilon, ni povas difini la signifon de la prepozicioj nur proksimume, kaj ĉio, kion mi diras en tiu ĉi artikolo pri la prepozicioj *el*, *en*, *ekster* kaj *inter* estas nur mia opinio, kiu povas esti vera aŭ malvera. La demando pri la internacia stilo entute kaj pri la prepozicioj speciale ŝajnas al mi tre grava, kaj mi pensas, ke nur per komuna laboro de homoj de diversaj nacioj ni povas bone ĝin decidi. Tial estas tre dezirinde, ke la esperantistoj de diversaj nacioj partoprenu en tiu ĉi laboro kaj per komunaj fortoj iom post iom ellaboru bonan, detalan esperantan gramatikon, kiu donos la eblon al ĉiu esperantisto evitadi la specialajn esprimojn de lia lingvo. Tiu ĉi internacia lernolibro estus gvidanto por ĉiuj estontaj aŭtoroj de la naciaj lernolibroj de nia lingvo, ĉar ĝi enhavus la tutan materialon de Esperanto.

La prepozicioj *el* kaj *en* estas laŭ senco kontraŭaj unu al la alia, kvankam *en* havas pli vastan enhavon, ol *el*; dume *el* esprimas la movadon el interne eksteren, la eliĝon el grupo, la eliron el certaj limoj, entute la eliĝon en la plej vasta senco; *en* ne sole servas por esprimi la kontraŭan, t. e. la movadon el ekstere internen, la eniĝon en ian grupon, la eniron en certajn limojn, sed ankaŭ ĝi signifas, ke la objekto *sin trovas* en certaj limoj de spaco, tempo aŭ cirkonstancoj. La prepozicio kiu havas sencan kontraŭan al tiu ĉi signifo de la prepozicio *en*, estas *ekster*, kiu montras, ke la objekto *ne trovas sin* en certa grupo (vivi ekster la homoj), en certaj limoj de spaco (ekster la domo), tempo (ekster tiu ĉi tempo) aŭ cirkonstancoj (ekster la leĝoj). Sed se mi deziras montri, ke la objekto *sin trovas* en la grupo de aliaj objektoj, tiam mi uzas la prepozicion *inter* aŭstataŭ *en*; sekve en kelkaj okazoj la prepozicio, kontraŭa al *ekster*, estas ne *en*, sed *inter*, kaj la prepozicioj *el* kaj *ekster* kune estas egalaj kaj kontraŭaj al *en* kaj *inter*.

La prepozicio *el* estas ankaŭ uzata por montri la materialon, el kiu la objekto estas farita.

Tiamaniere oni povus difini tiujn ĉi kvar prepoziciojn en la sekvanta maniero:

En signifas: 1) ke la objekto *eniras* en certajn limojn de spaco, tempo aŭ cirkonstancoj en la plej vasta senco de tiu ĉi vorto (manieroj, formoj k. t. p.). En ĉiuj tiuj ĉi signifoj la prepozicio *en* estas uzata kun akuzativo, ekz. veturi en vilaĝon, transporti la kalkulon en la sekvantan jaron, traduki en lingvon svedan, transformiĝi en ŝtonon, disfali en pecetojn, enĵeti iun en koleron:

2) ke la objekto *sin trovas* en certaj limoj de spaco, tempo aŭ cirkonstancoj (manieroj, formoj k. t. p.). En tiuj ĉi signifoj la prepozicio *en* estas uzata ĉiam kun nominativo, ekz. loĝi en vilaĝo, promeni en arbaro, veni en bona tempo, paroli en lingvo sveda, esti en kolerio, en bona humoro, agi en tia maniero.

El signifas: 1) ke la objekto *eliras* aŭ eliĝas, esceptiĝas el grupo, el certaj limoj de spaco, tempo aŭ cirkonstancoj en la plej vasta senco de tiu ĉi vorto; entute ĝi signifas la eliĝon, la esceptiĝon en la plej vasta senco, ekz. plej

bona el ĉiuj homoj, eliri el la ĉambro, sentenco el Korano, el la tempoj pasintaj, el ĉio dirita estas klare, traduki el lingvo sveda, liaj vortoj venas el koro.

2) *el* servas por montri la *materialon*, el kiu estas farita la objekto, ekz. ringo el oro, kubo el ŝtono.

Inter signifas: 1) ke la objekto *eniras* en grupon de aliaj objektoj (en tiu ĉi signifo *inter* devas esti uzata kun akuzativo), ekz. li venis inter homojn; 2) ke la objekto *sin trovas* en la grupo de aliaj objektoj (kun nominativo). La plej malgranda grupo konsistas el du objektoj, sekve la esprimoj: “esti inter tero kaj ĉielo“, “loĝi inter Upsala kaj Stockholm“ estas tiel same regulaj, kiel “vivi inter hindoj“ aŭ “inter ni ĉiam reĝas konsento.“

Ekster signifas, ke la objekto *ne trovas sin* en grupo, en certaj limoj de spaco, tempo aŭ cirkonstancoj. Ekz. ekster la urbo, ekster la limoj de mia patrujo, mi estas libera vespere de 8-a ĝis la 10-a horo, sed ekster tiu ĉi tempo mi estas okupita, ekster la leĝoj, ekster ni, ekster la homoj.


Ĉion diritan ni povas prezenti per la sekvanta ŝhemo:

<i>El</i>		<i>Ekster</i>	
el limoj	el grupo	ne en grupo	ne en limoj
en limojn (akuzativo)	en grupon (akuzativo)	en grupo	en limoj
En	Inter		En

La prepozicioj *en*, *inter*, *el* kaj *ekster* estas ankaŭ uzataj kiel prefiksoj. La prefiksoj *en*, *inter* kaj *ekster* havas la saman signifon, kiel la prepozicioj *en*, *inter* kaj *ekster*, sed la prepozicio *el* akiras en la rolo de prefikso ankoraŭ unu signifon: oni uzas ĝin por montri, ke la agado, esprimata de l' verba radiko, estas tute finita, plenumita, ke la celo de agado estas atingita, ekz. *elplugi* (abackern) signifas fini la plugadon; *elpetegi* (abbeteln, abfliehen) — atingi per petego; *elrosti* (abbraten) — fini la rostadon; *elservi* (abdienern) — akiri per servado, fini la servadon; *eltani* (abgerben) — plenumi, fini la tanadon k. t. p.

V. Gernet.


Odessa (Rusujo), Remeslennaja, 11.



Kuzino, ne faru kaprican vizagon...

Kuzino, ne faru kaprican vizagon;
 Mi kantus vin, sed mi ne havas kuraĝon.
 Mi volis ekkanti la buŝon ravantan,
 Sed viaj okuloj tuj mendis la kanton.
 Mi volis ekkanti la nigrajn okulojn.
 Sed tuj la mentono elmetis postulojn.
 Mi volis ekkanti mentonon malgrandan,
 Sed la piedetoj nun faras demandon.
 Mi volis... por doni al ĉiuj kontenton
 Mi havas nek tempon, nek indan talenton,
 Kaj vi mem, kuzino, min punus severe,
 Se ĉion kantindan mi kantus libere.

Amiko.



Nova gazeto internacia.

En la decembra numero de l' "Lingvo Internacia" ni jam sciigis niajn legantojn, ke la estinta redaktoro de la folieto "Volapük", s-ro Max Wahren en Hannover, intencas eldonadi ĉiumonatan gazeton, dediĉitan al la ideo de lingvo internacia, kaj intencantan propagandi tiun ĉi ideon kaj ellabori la plej perfektan formon de lingvo internacia. La intenco de s-ro Wahren jam efektiviĝis, kaj la unua numero de l' nova gazeto eliris sub la titolo *Linguist*. Tiu ĉi numero enhavas artikolon de la redakcio, mallongan artikolon de s-ro Heintzeler pri diversaj mondlingvoj, unu paĝon da vortoj internaciaj (34 vortoj, el kiuj 29 estas esperantaj), kelkajn mallongajn sciigojn (interalie pri la internacia poŝtsigno) kaj fine artikolon pri magiaj kvadratoj. Tiu ĉi lasta artikolo estas presita en Volapük, ĉiuj aliaj en la lingvo germana kun volapüka traduko. La germana teksto okupas 8 1/2 paĝojn, la volapüka 6 paĝojn.

La redakcia artikolo klarigas la celon de la gazeto en sekvanta maniero:

— La apero de Volapük elvokis tian eksciton kaj ravon, ke oni komence ne rimarkis la difektojn de tiu lingvo. Sed kiam la kritiko anstataŭis la unuan ravon, oni komprenis, ke Volapük devas esti multe pliperfektigita, antaŭ ol ĝi taŭgos en la rolo de lingvo internacia. La apero de multaj eblaj kaj ofte ankaŭ neeblaj projektoj de lingvo internacia, inter kiuj havis sukceson sole la "Lingvo Internacia Esperanto", de d-ro Zamenhof, elvokis la malkonfidon de la publiko al la ideo mem de lingvo internacia. Tiam venis la tempo de pli profunda ellernado de la problemo en ĝia leksikologia kaj gramatika parto. La celo de la gazeto estas efektivigo kaj disvastigo de la ideo pri lingvo internacia, fondita sur la ekzistanta jam kaj komuna por ĉiuj kleruloj internacia vorttrezoro. Ĉiuj amikoj de la lingvo internacia estas invitataj senpartie kunlabori kaj libere esprimadi siajn opiniojn pri la demando de mondlingvo kaj ĝia la plej simpla kaj praktika solvo. La laboroj de la "Kadem bevünetik volapüka" kaj ĉiuj aperoj en la regiono de la internacia literaturo ankaŭ trovos lokon en la gazeto, kiu penos donadi al la legantoj eble precizan raporton pri la stato kaj sukcesoj de la lingvo internacia en la tuta mondo. —

Oni vidas sekve, ke la "Linguist" havas tian saman celon, kiun celas ankaŭ nia gazeto, sed la rimedoj, elektitaj de la redakcio de "Linguist" ion diferenciĝas de la rimedoj kiujn ni uzas. La "Linguist" deziras *ellaboradi* novan lingvon internacian, ni propagandas la lingvon *ekzistantan* kaj *bone elproviditan praktike*. Kiu agas pli bone? Pri tio ĉi ni jam esprimis nian opinion en la artikolo "El la mondo volapüka" *) kaj ne bezonas ĝin ripetadi. Ni povas nur aldoni, ke n nei tute komprenas, kiamaniere la redakcio de "Linguist" plenumados sian programon. Kiu nenion pensas pri la lingvo internacia, tiu neniam abonos gazeton, speciale dediĉitan al tiu ĉi demando, sekve la "Linguist" povos propagandi la ideon de la lingvo internacia nur inter la adeptoj de tiu ĉi lingvo, t. e. ne atingos la celon. La dua parto de la problemo — ellaboro de perfekta lingvo internacia — ankaŭ, ni pensas, neniam estos plenumita, ĉar kiamaniere la redakcio pensas atingi la necesan komunan konsenton de ĉiuj partoprenontaj en tiu ĉi laboro? Ni ne povis atingi la konsenton en la jaro 1894, kiam estis proponitaj la reformoj en Esperanto,


*) Vidu la decembran numeron de "Lingvo Internacia".

kvankam, ŝajnas al ni, estas multe pli facile konsenti pri ŝanĝoj en lingvo jam ekzistanta, ol en ĉiuj demandoj, kiuj povas naskiĝi ĉe la kreado de lingvo tute nova.

La redakcio de "Linguist" tre deziras unuigi la adeptojn de diversaj sistemoj de lingvo internacia kaj aliri ankaŭ la esperantistojn al sia entrepreno, sed ni iom ĝenas rekomendi al la esperantistoj la gazeton, kiu estas presata en la lingvo germana, kiun ne ĉiuj esperantistoj scias, kaj en la sovaĝa Volapük, kiun komprenas preskaŭ neniu el la esperantistoj. Se la redakcio de "Linguist" sincere dezirus *unuigon*, ĝi farus ion por atingi tiun ĉi unuigon kaj elektus la lingvon Esperanto anstataŭ Volapük. La redakcio de "Linguist" pensas, ke la plimulto da amikoj de l' lingvo internacia, kiuj ne scias la lingvon germanan, komprenas Volapük, sed ni havas la rajton iom dubi je tio kaj pensi, ke la redakcio deziras ne la unuigon, sed la *aliĝon* de la esperantistoj, t. e. ke ni forlasu nian lingvon — taŭgan por skriba kaj buŝa interkomunikiĝo kaj tute pretan — kaj aliĝu al nova lingvo, ankoraŭ ne kreita. Vere, se la esperantistoj fariĝos membroj-fondantoj de la societo, kiu subtenas la gazeton*), ili havos tiam voĉon en la aferoj, koncernantaj la gazeton. Sed bedaŭrinde ni ne scias, en kiaj rilatoj sin trovas la membroj-fondantoj al la redakcio de la gazeto, kiajn rajtojn ili havas, krom la rajto sin nomi membro-fondanto kaj kritikadi la agadon de la redaktoro. Ĉu ili decidus, en kia lingvo devas estis eldonata la gazeto, ĉu ili elektas la redaktoron kaj donas al li instrukciojn? — Tial, proponi al la esperantistoj fariĝi membroj-fondantoj signifus nur proponi, ke ili sendu al s-ro Wahren po 20 markoj. Vere, la redakcio promesas pligrandigi la amplekson de la "Linguist" kaj presadi artikolojn ankaŭ en Esperanto, se la esperantistoj helpas materiale, t. e. la redakcio konsentas vendi la rajton presadi en "Linguist" artikolojn en lingvo Esperanto; bedaŭrinde ĝi ne difinas la prezon de tiu ĉi rajto kaj ni ne scias, per kia sumo da mono la esperantistoj devas helpi, por ke la redakcio konsentu presadi artikolojn en nia lingvo.

Ni havas nenian rajton rekomendi al niaj amikoj ian aferon tiel nedifinitan kvankam ni tre dezirus unuigi kun la volapükistoj. Ni povas nur promesi, ke ni komunikados al niaj amikoj pri la agado de la volapükistoj, por ke ĉiu mem povu decidi, kiel li devas rilati al la nova entrepreno.

V.



Ŝipeto.


Sur ondoj malvarmaj, sur maro bruante
Vidiĝas ŝipeto naĝanta;
Ĝi forte kun maro bolanta batalas:
Konstante leviĝas kaj falas.
Sed tute ne vane ŝiriĝas la velo:
Ŝipeto rapidas al celo.
Ĝin paca ripozo atendis post veno
En bona, trankvila haveno.

Seleznet.

Trioleto.

Via buŝo, rozvanga fraŭlino,
Kiu brilas ĉarmegon ravantan,
Logas min al kisado senfina, —
Via buŝo, rozvanga fraŭlino.
Sed enhavas dentvicon tranĉantan
Kaj minacas al volo obstina
Via buŝo, rozvanga fraŭlino,
Kiu brilas ĉarmegon ravantan.

Amiko.



* Vidu la artikolon "El la mondo volapüka" en la antaŭa numero de nia gazeto.

Sultano kaj saĝegulo.

(Turka fabelo de Habuu-bejo *).

El la lingvo rusa tradukis V. Gernet.

Por ĉiuj, aŭskultantaj la vorton de l' Profeto, estas tute kredinde, ke kiam la granda Ejub-Sal-Edin ombrigis el Al-Kairo la mondon per la standardo de l' kredo, farinte tiun ĉi urbon la radiluma centro de vero, lumo kaj gloro, — tiam la Ĉefanĝelo Gabrielo transŝovis la ĉielon, superpendintan ĝis tiu tempo la Mekkon, kaj fortikigis ĝin super la nova ĉefurbo de la Islamo.

La havantaj okulojn por vidi respektete rigardas ĝis nun en tiu ĉi ĉielo la vojon de l' Profeto sur la ĉevalo El-Borak, kiu veturigis la Profeton en superojn, dume la anĝeloj surŝutadis la vojon per eterne-blankaj nepereemaj rozoj de la paradizo. En la mallume-blua ĉielo la hele-brulantaj steloj estas disĵetitaj kiel misteraj arĝentaj monogramoj kaj ŝifroj, enhavantaj la nomojn de Dio kaj la sentencojn el la Korano, kiuj kvietigas sovaĝajn bestojn kaj malbonulojn.

Oni ne miru, ke sub tia ĉielo la pia kaj saĝa, grandanima kaj kuraĝa, potenca kaj justa sultano Sal-Edin ne devis timi noktajn aventurojn en mallargaj stratoj de l' urbo malnova, se eĉ lia animo estus atingebla por la timo. Kontraŭe, la sultano, ŝanĝinte tiel la vestaron, ke neniu lin ekkonadis, serĉis aventurojn kaj reciprokan proksimiĝon kun homoj, por kontroli siajn registrojn, por senpere ekkonadi la bezonojn kaj mizeron de la popolo, por trovi la saĝulojn kaj honestulojn, kiujn li povus proksimigi al la trono por utilo de la popolo.

La popola famo montris al Sal-Edin en malgranda domo en rando de l' urbo saĝegulon, kiu pasigis tagojn kaj noktojn apud siaj libroj sed tamen ne evitadis homojn. Kuracante korpojn kaj animojn, Abu-Amran helpadis al la homoj per saĝaj konsiloj en malfeliĉaj okazoj de la vivo.

La ordonanto de la ĝustreligianoj sciis, ke kristala freŝiganta fonto ofte estas kaŝita en forlasita puto, kiun abomenas la nesaĝaj migrantoj. La sultano do ĉie serĉadis la bonon kaj veron.

Dum unu el siaj noktaj migradoj Sal-Edin ekfrapis la pordon de Abu-Amran kaj estis tuj enlasita.

“Mi deturnas vin de piaj kaj instruaj laboroj“, diris la sultano post la kutima saluto.

— Se mi povas iel helpi, tiam ĝi nin ne haltigu. La plej sanktajn rajtojn havas la bezono. Rapidanto por la komuna preĝo ne riskas malfrui, se li devas haltiĝi en la vojo por doni ion al proksimulo.

La sultano rakontis pri unu el siaj embarasoj, kaŝinte, kompreneble, kiu li estas, kaj restis tre kontenta je la respondo. De tiu ĉi tempo Sal-Edin ofte alvenadis por interparoladi kun la saĝegulo kaj, proksimiĝinte kun li, ne ĉesadis miri lian profundan saĝon kaj detalan scion pri homoj.

*) Tiu ĉi fabelo estis originale verkita en la lingvo rusa de unu el la odesaj bone konataj leĝoscienculoj, kiu ekdeziris kaŝi sian nomon sub la pseŭdonimo “Poperek“, kaj presita en jaro 1885 en la gazeto “Odesskij Vestnik“. La aŭtoro de la fabelo foriris jam en la mondon pli bonan, la gazeto ankaŭ ne ekzistas. Pensante, ke la sprito kaj la bela orienta koloreto, enhavataj de la fabelo, plaĉos al niaj amikoj, mi tradukis ĝin, farinte en ĝi kelkajn negrandajn abreviaturojn. *La tradukinto.*

Dum unu vespero la sultano trovis, ke lia saĝa konsilisto sidas sur la tero en disŝirita vesto.

“Kio okazis kun vi, ho saĝegulo?” demandis la sultano.

— La plej granda malĝojo sur la tero: mi perdis mian maljunan patrinon.

“Ĝi estas, kompreneble, ŝarĝa perdo por la filo, diris la sultano; sed via saĝeco kaj via kredo devas vin defendi de la malespero.

— Per la amo, kiun nature havas la kreinto al sia kreitaĵo, la mondo estas kreita kaj teksita, respondis la saĝegulo. Perdi amatan kaj amantan ekzistaĵon, — tio ĉi signifas eksenti la frapon en la plej vivplenajn ligojn kaj kune seniĝi la plej efektivan kaj la plej kostan bonon.

“Sed la kredo diras, ke la perdo estas tempa: en la estonta vivo ni trovos ree la karajn por nia koro.”

— En la estonta vivo, diris la saĝegulo, la atingintoj senmortecon estas ligitaj per la eterna kaj por ĉiuj komuna frata amo. Tie forestas la gepatroj, infanoj, edzoj kaj edzinoj; forestas, sekve, tiu amo, kiu apartigas por ni la ekzistaĵon amatan, kiel ion plej karan en la tuta mondo, — kaj la rabito de la morto estas ĉiel rabita senredonote. — Jen estas nun la unua punkto, kiun mi ne pasigas kun la libro post tia tempo, kiam la libro fariĝis mia plej kara amiko. La ordinaran malĝojon oni povas venki per la laboro, sed ekzistas ankaŭ malĝojo, de kiu fortiri sin estas la plej terure por la suferanto. Kiam la anima vundo estas ankoraŭ freŝa, tiam mem la penso, ke vi estos iam malpli sentema por tiu ĉi malĝojo, estas neesprimeble turmentanta.

Vidante, ke Abu-Amran ne evitas tamen la interparoladon, kaj esperante lin distri, la sultano komencis paroli pri aliaj objektoj.

“Antaŭnelonge, li diris, mi aĉetis sklavon. Li estas rimarkinda belulo kaj mi sentas grandan favoron al li. Mi dezirus fari tiun ĉi sklavon la domestro, sed la homoj diras: ne kreu al la ekstero. Ĉu efektive la agrabla ekstero postulas pli grandan singardemecon? Kial ĝi estas?”

— La ekstero, rediris la saĝegulo, faras impreson sur la imago kaj ĝenas la agadon de l' prudento. La imago do nur per Dia helpo povas diveni la veron aŭ alkonduki al feliĉa eltrovo; sen tiu ĉi helpo la imago ne povas doni garantion, ke ĝi kondukas al la vero. La okulo, ĉiam delogata de l' ekstero, estas la plej nebona konsilisto por juĝi pri la homoj, ĉar tiu ĉi organo de sento plej forte, se eĉ ne escepte, efikas la imagon.

“Laŭ viaj vortoj, rimarkis la sultano, oni devas kun fermitaj okuloj juĝi pri la homoj.”

— Se vi povas eksciadi entute la homojn, tiam, liberante sin de la delogado per la ekstero, vi, kompreneble, riskas malpli. Oni ekscias homon pli bone, aŭskultante liajn paroladojn, se nur oni scias legi en ili liajn pensojn. Publika situacio, speco de okupadoj, saĝo kaj scioj, moro kaj karaktero — ĉio regule refleksiĝas en maniero de homo agadi rilate aliajn homojn kaj en liaj juĝadoj pri diversaj objektoj.

Pasis kelke da novaj lunoj. En daŭro de tiu ĉi tempo la sultano vizitis ankoraŭ unufoje Abu-Amran'on kaj ekvidis, ke li rekomencis jam lian kutiman manieron de vivado.

Unu fojon matene al la mirigita Abu-Amran venis la estro de l' palacaj korpogardistoj kaj ordonis al la saĝegulo iri en la palacon.

Tie ĉi oni diris al li:

“La sultanon atingis la famo pri via neordinara saĝeco. Oni tre laŭdis antaŭ li vian spritecon kaj fariĝis granda veto, ke vi kun kovritaj okuloj

trovos la sultanon en lia palaco inter la korteganoj. Kun kovrilo sur la okuloj vi povos penetri ĉien en la palaco; serĉu la sultanon, kaj se vi lin trovos antaŭ la suna malleviĝo, tiam via feliĉo sur la tero estos firmita, ĉar sur vin elverŝiĝos la favoroj de la sultano.“

Abu-Amran komprenis, ke restas por li nenio pli, ol peni plenumi la volon de l' sultano.

Kaj jen la saĝegulo devigita infane blindludi, komencis eraradi en la luksaj ĉambroj, altirante komunan atenton.

En unu loko kelke da homoj ekvolis ŝerci kaj moki lin; la aliaj estis rilate lin pli-malpli atentaj kaj ĝentilaj.

Migrante en la labirinto da ĉambroj, li venis en ĉambron, kie li eksentis fortan malsobrigantan odoron. Estis facile diveneble, ke la loĝanto en la ĉambro bone konas la haŝiŝon*) kaj la opion kaj la fortan kafon, kaj, eble, eĉ la drinkaĵojn, senkondiĉe malpermesitajn de la Korano.

“Ha! tio ĉi estas vi, la blindita saĝegulo!” elparolis maldelikata voĉo: — “vi posedas enviindan sorton, ĉar vi facile povas aperigi por vi la pluvon da favoroj de l' sultano.“

“Mi volonte cedus al vi mian lokon“, rediris Abu-Amran.

“Rakontu tion ĉi al iu alia! Vi kune kun necesaj helpantoj artiste komprenis aranĝi komedion kaj eksciti la scivolon de l' sultano. Sed vi ne eliros de tie ĉi, se vi ne promesos dividi kun mi la unuan donacon, kiun vi ricevos hodiaŭ de l' sultano.“

“Mi volonte promesas.“

“Ne, ĝi ne sufiĉas. Vi devas ĵuri, ke la promeso estos plenumita, kaj vi devas restigi tie ĉi vian zonon kiel signo de via ĵuro. Se vi ne plenumos la juron, tiam vi estos pendigita per tiu ĉi zono inter la paradizo kaj la infero; de supre estos alportataj al vi la bonodoroj de l' paradizaj mangaĵoj, tiklante vian flaron, de malsupre do vi estos fumadata de la bolanta infera sulfuro.

Abu-Amran restigis sian zonon kiel signon de l' ĵuro kaj feliĉe eliris.
(Fino en la sekvanto n:o.)

ANONCOJ.

Al la amikoj esperantistaj,

kiuj al mi alsendis gratulojn por la Nova Jaro, mi resendas mian koran dankon.

V. Solodihin.

Ĉiuj amikoj,

kiuj sendis al mi siajn bondezirojn por la Nova Jaro, estas petataj akcepti la plej koran dankon kaj amikajn redezirojn.

V. Langlet.

Depot' da semoj.

M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskvo, Sadovaja, Krasnija vorota, domo Rauzer)

vendas

ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 30 kopek en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — *senpage*. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj ankaŭ en la lingvo Esperanto.

*) Narkotika preparato el la folioj de l' hinda kanabo.

Rusaj abonantoj volu sin turni al s-ro V. Gernet, Troickaja kaj Remeslennaja 11, *Odessa*.

Francaj abonantoj sin turnu al s-ro L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.

Germanaj — al s-ro W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.

Portugalaj — al d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.

Ĉe tiuj sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

Aliaj volu mendi la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio. La monon oni plej bone ensendas per poŝta mandato.

A. Kofman en *Odeso, Rusujo*,
Neĵinskaja 34, deziras akiri la
"Esperantiston" por la jaro 1890
por mono aŭ sanĝe je aliaj objektoj.

Eliris el presejo la nova verko (N:o
84) de nia literaturo:

Ŝtona Gasto

de *A. S. Puŝkin*.

Proza taduko de *N. Bororko*.

Kosto 0,50 fr. 0,40 mark —
0,40 kron. 20 kop.

Oni povas venigi la verkon de d-ro
L. Zamenhof (Grodno, Rusujo) aŭ de
s-ro *V. Gernet* (Odeso, Rusujo, Remeslennaja 11).

Anstataŭ mono estas akceptataj
poŝtsignoj de ĉiu lando.

Por svedoj ni rekomendas:

1) *B. G. Jonson*. Lärbok med fullständig Esperantisk-svensk ordbok. 40 öre.

2) *Svensk—Esperantisk ordbok*. 40 öre.
Riceveblaj de *Upsala Esperantoförening, Upsala*.

Nova verko en la lingvo Esperanto:

La literaturisto kaj lia fianĉino

Rakonto de *E. Flygare-Carlén*.

Trad. *Otto W. Zeidlitz*.

Eldono de la Esperantista Klubo
en Upsala.

Kosto 0,50 fr. = 0,40 kr. = 0,40 mrk.
= 0,20 rub.

Ricevebla de *Upsala Esperantoförening, Upsala*.

Pago por anoncoj en la "Lingvo internacia":

20 centimoj = 15 öre = 15 pfenigoj = 8 kopekoj por la loko, okupata de la duonpaĝa linio da petito. Por grandaj kaj konstantaj anoncoj rabato. Anoncoj, kiuj havas signifon por progreso de la lingvo Esperanto,

senpage.

Ĉiu paginta por kvar ekzempleroj de la "Lingvo internacia" ricevas la kvinan

senpage.